Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

110-a jaro • n-ro 1319 (12) | **decembro 2017**

Strategia Forumo pri la Orientazia Movado kaj la 4-a Sudazia Seminario
Rakontas Mark Fettes kaj Lee Jungkee | 244
Stefan MacGill | 246

Velado al la Itala Kongreso 2017
Bonega ekzemplo de faka agado en Esperanto: naŭ bravaj partoprenantoj atingis la kongresejon per velboato! | 252

Volontuloj de la Centra Oficejo prezentas sin
Kvar volontuloj rakontas pri sia agado en la oficejo | 243

ISSN 0014-0635

Esperanto estas riĉa kaj memsufiĉa lingvo kun abunda terminologio en faka agado

Fotoj de Alessandro Mazzetti kaj Laurence Aïdonidis

Velado al la Itala Kongreso 2017

Alessandro Mazzetti (la ŝipestro), kun kontribuaĵoj de la partoprenintoj

Naŭ bravaj partoprenantoj de la Itala Kongreso 2017 atingis la kongresejon per velboato!

Dum la semajno antaŭ la kongreso okazis septaga ŝipvojaĝo por esperantistoj laŭ la Ionia Maro en la pitoreska Golfo de Taranto (sudorienta Italio, Mediteranea Maro). Ni veladis admirante de sur la maro la plej tipajn vilaĝetojn de la regiono kaj ĝiajn mirindajn naturvidindaĵojn.

La partoprenantoj venis el Francio, Bulgario, Svisio, Kroatio, Germanio, Ĉeĥio kaj Italio (vidu la mapon). Velumi estis ŝanco por interkomuniki kun samideanoj kaj ferii kune ene de la emocia nekutima kadro de la velkrozado. Estis oportuno por viziti interesajn lokojn en formo de respondeca turismo. *Mi tre ŝatis la esperantistan etoson vivi kune en mallarĝa spaco dum unu semajno, la senton de libereco, la maron!* – diras Ivan el Bulgario.

La partopreno estis malfermita al ĉiuj, kaj novicoj kaj velistoj. Ne estis bezonata antaŭa sperto pri velŝipado, tamen ĉiu partoprenanto havis la eblon stiri la jaĥton kaj praktiki la velŝipajn manovrojn. *Antaŭe mi neniam partoprenis iun veladon* – diras Ana el Kroatio – *kaj mi volis vidi kiel ĝi aspektas. Finfine ĉio estis tre amuza.*

La velkrozado estis didaktika travivaĵo, tamen ne estis kurso de Esperanta faklingvo pri velado, sed kurso de velpraktikado en Esperanto. La jaĥtestro donis al ĉiu partoprenanto ilustritan kajeron pri velŝipaj manovroj en Esperanto (vidu bildon). La jaĥtestro estis sperta itala velisto kaj vela instruisto, volontulo, membro de Grupo Esperanto Tigullio. *Antaŭe, mi estis iomete dubanta ĉu aliĝi aŭ ne,* – diras Carla el Italio – *ĉar por mi estus la unua fojo en velboato kaj mi konis neniun el la teamo... Ĉi tiu velado estis vere enviinda travivaĵo kaj ni ĉiuj esperas denove kune amuziĝi en la estonteco.*

La jaĥto estis luita rekte najbare de la kongresejo, kaj estis de la modelo "Bavaria 44", 14 metrojn longa, kun 4 kajutoj, 10 kuŝlokoj, 2 necesejoj, kuirejo kaj saloneto. La enŝipiĝo okazis en la haveno de Policoro kaj dum la semajno ni navigis vizitante Gallipoli, Porto Selvaggio (Sovaĝan Havenon), Porto Cesareo kaj Taranto. Ni velis proksimume 4-8 horojn tage kaj la tuta itinero estis ĉirkaŭ 150 marmejloj. La vetero estis bona, kun norda vento de 15-20 nodoj, sennuba ĉielo, varma temperaturo, pura mara akvo. Nur unu tagon la vento estis tro forta kaj ni profitis la okazon por resti sur la tero kaj viziti la fortikigitan mezepokan citadelon de Gallipoli.

Ĉiujn tagojn ni faris mallongajn lecionojn de vela praktikado kaj ĉiuj partoprenantoj lernis la nodojn, la jaĥtan stiradon, la velan reguladon, la ŝnuran ĵetadon ktp. Ni vele navigis efektivigante boardojn, ĝiradojn, bulenojn, ankradojn, albordiĝojn kaj aliaj emociajn velajn manovrojn. *Mi plej ŝatis la veladon kontraŭ la vento* – memoras Ana – *malplej kun vento*. La juna partoprenanto Šebi el Ĉeĥio estis tute novico pri vela praktikado, sed ja li rapide lernis ĉiujn manovrojn kaj, dum la lastaj tagoj, li estis la favorata helpanto de la ŝipestro. *Ni parolis pri*



la diro "VIRO en maro!" kaj mi ekkriis – memoras Carla – *Mi esperas, ke oni dirus "HOMO en maro!", kaj ĉiuj ridadis pri virinoj forlasitaj sen helpo, hihihi!*

Ni preskaŭ ĉiam manĝis en la jaĥto, dum la navigado aŭ ankrite, dank' al la kunlaboro de ĉiuj partoprenantoj por la proviantado, la kuirado kaj la telerlavado. Apartan dankon al la itala partoprenanto Gianantonio, kiu estis tre lerta kuiristo! Nur unu fojon ni vespermanĝis en restoracio ĉe pitoreska fiŝfritejo en la antikva vilaĝeto Gallipoli. *Mi estis tre surprizita konscii* – diras Ivan – *ke la plej serioza partoprenanto, Hans el Germanio, eĉ dum la vesperaj drinkadoj de forta alkoholaĵo, ne avaris per siaj rimarkoj pri akuzativo, mi ŝatis "ĝin" (kun tonik, hahaha)!*

La tranoktadoj estis ĉiam ene de la jaĥto en du-kuŝlokaj kajutoj, ni tranoktis kelkfoje en havenoj, kelkfoje ankrite en golfetoj, tamen ni ankaŭ velis nokte: unu fojon ni atingis je noktomezo la golfeton por la ankrado. *Mi miris kaj ege ĝojis* – diras Laurence el Svisio – *ke naŭ fremdaj partoprenantoj, allogitaj de la deziro veladi kaj paroli Esperanton, kapablas, ekde la komenco, partigi harmonie la komunajn taskojn, vivi kune en tre malgranda spaco dum unu semajno en familia kaj malstreĉita etoso*. Unu fojon ni vekiĝis je la 4-a horo matene por vidi la sunleviĝon vel-navigante en la silento kaj ni matenmanĝis admirante la sunon sur la horizonto.

Iun tagon, stirante la velŝipon, – diras Michèle el Francio – *subite mi vidis delfenojn kaj ekkriis montrante perfingre lokon, kie delfenoj aperis kaj tuj malaperis sub akvon. Mi kriis plurfoje "Delfenoj, delfenoj!", sed neniu vere reagis, ĉar ĉu iu filmis, ĉu iuj babiladis, aliaj sonĝis. Mi restis sole kun mia levita fingro kaj la delfenoj senrevene malaperis...* La velumantoj, ensorbite de la naturaj elementoj, estis en strikta kontakto kun la maro, la vento kaj la simpleco; sen bruo, sen malŝparo, sen urĝo.

Velumi estas sporto, kiu postulas reciprokan respekton, kunlaboron en deĵorteamo kaj justan kundividon de la rimedoj (akvo, nutraĵoj, energifontoj). *Mi amas veladi kaj multfoje faris ĝin kun membroj de la vela klubo de mia urbo* – diras Gianantonio, lerta velisto el Italio – *sed ĉi-foje mi rimarkis, ke malgraŭ la nekono de aliaj partoprenantoj antaŭ nia unua renkonto en la haveno, tuj la spirito de kunvivado ĉirkaŭis nin. Amuza sperto, kiun mi neniam provis. Tre plaĉis al mi longaj vesperaj babiladoj pri ĉiaj temoj. La memoro de tiuj belegaj tagoj akompanos miajn vintrajn tagojn en la atendo de la venonta krozado.*

La lastan tagon ni revenis ĉe la starta haveno, kie ni renkontis aliajn kongresanojn kaj ni invitis ilin trinki brandon en nia boato. Ĉiuj partoprenantoj havis belegan memoron de ĉi tiu semajno kaj, post la reveno hejme, skribis al la grupo dankmesaĝojn.

Kiam mi rememoras mian velŝipan vojaĝon, – diras Michèle el Francio – *mi vidas multajn bildojn, sed mi ankaŭ aŭdas muzikon, ĉu la bruon de la vento en la veloj, ĉu diversajn muzikojn, kiujn Alex elektis laŭokaze: pompan muzikon, kiam Šebi grimpis ĝis la pinto de la masto, ekzotikan muzikon, kiam ni ankris por naĝi, klasikan muzikon por revi navigante, aĉan muzikon kiam ni pakis niajn valizojn por nia foriro. Muziko mildigas morojn, oni diras, sed ankaŭ velŝipadon!*

Ĉi tiu pozitiva travivaĵo stimulas nin organizi denovan veladon dum la somero 2018, eble lige al la Universala Kongreso.